

Dentotekniko

M. Pavlik, SSR-972 01 Bojnice,
Zubná laboratórium

Trajtoj de laboro en dentoteknika laboratorio

Rimarko de la redakcio:

Dum la IV-a IMEK en Poprad 1983 la aŭtoro Marian Pavlik prezentis sian prelegon per diapozitivoj. Por nia cirkulero prilaboris malgrave la tekston F. Pfeifer.

La celo de tiu populara prelego estas informi vin pri enhavo kaj metodoj de dentoteknika laboro. Por sukcesa laborrezulto en ĉiu fako estas necesa bona kunlaboro. En stomatologia sekcio temas pri kunlaboro de trimembra teamo konsistanta el kuracisto, asistantino kaj teknikisto. La dentoteknikisto estas helpanto de dentokuracisto en proteza laboro.

La enhavo de lia laboro estas pretigi protezajn kaj makzelortopediajn produktaĵojn.

La protezproduktaĵoj oni povas dividi, depende de ilia fiksado en buŝo de paciento, en du grupojn:

Unue temas pri fiksaĵoj kaj due pri elpreneblaj protezdentaroj. Aparta speciala grupo estas la pretigo de la makzelortopediaj aparatoj. Ilia celo estas korekti la formon de dentarko, deklini ĝin kaj rotacion de unuopaj dentoj.

Sed unue ni direktas nian atenton al la grupo fiksanta dentoprotezo. Tio estas kronoj kaj pontoj. Tiun fiksan artefaritan dentaron oni aplikos prioritare en la tranŝodenta regiono, anstataŭ igi dentomankojn.

La grupo de la elprenebla artefarita dentaro estas part- kaj totalprotezoj por makzelo kaj mandiblo.

Bazaj materialoj uzataj en laboratoria tekniko estas jenaj: Valormetalo, artefarita (plasto) kaj ceramika materialoj. La dentokuracisto decidas pri tipo de farota dentaro kaj faros premsignon. Ĝi estas necesa por ĉiu ajn tipo de farota dentaro. Nun estas tasko de la dentoteknikisto, ke li gisas gipsan kaŝon en la premsignon. Post solidiĝo de la engisita gipso kaj disigo de la premsigno oni ricevos originalaspektan kopion de enbuŝa stato. Ĝi estas la labormodelo.

Decidan signifon por aspekto de estonta protezdentaro havas fiksado de intermakzelaj rilatoj. La dentokuracisto, en buŝo de la paciento fikso la pozicion de mandiblo kontraŭ makzelo. Li faros decidon pri grandeco kaj formo de dentoj kaj multaj aliaj detaloj. Esploritajn datumojn li donas al la laboratorio kaj ili estas poste gvidilo por la teknikisto dum la pretigo de la estonta dentarmodelo. Tiu ĉi modelo de la estonta protezdentaro estas kutime el vakso. La bazo estas ĉiam modlovakso kaj la dentoj estas plastaj. Ĉiam la plasto estas metilmetakrilato. La teknikisto starigas la plastajn dentojn en la vakson sur modeloj, kiuj estas firme fiksitaj en la plej simpla artikiga aparato, tiel nomata okludilo. Post la provo de la vaksa protezdentaro en la buŝo de la paciento sekvas procedo, post kiam la vaksbazo de la protezdentaro estas anstataŭigata per plasta. La tutan modelon de la protezdentaro (gipso- kaj vaksomodeloj) oni metas en dupartan metalan kuveton kaj plenveros ĝin per gipsa kaŝo.

Helpe de varmakva buŝo oni forigos vakson kaj en la spacon oni premas paston el plasto. Malmoliĝo de plasto efektiviĝas per polimeriĝa procezo, kiu estos priskribita poste. Por fintajlo (fajna prilaborado) oni uzas variajn (krud- kaj fajngrajnajn) polurtonojn kaj rotaciajn polurbrosojn kun necesaj polurrimedoj (ekzemple pumiko pulvorigita).

Polimerigan procezon oni uzas ankaŭ la produktado de artefaritaj plastokronoj. Sur izolitan modelon de preparita dentostumpo necesas modli el akrilatpasta proksimuman formon de estonta denta krono. La modelon kun plasta kronformo oni metos en polimerigan aparaton. En tiu ĉi aparato efektiviĝas polimerigo. Tio estas malmoligo de plasto per kuirado kaj altigita aerpremo (600 kPa) kaj varmo de 92 gradoj Celsius dum daŭro de 15 minutoj.

Gravan parton de laboro prezentas la prilaborado de metaloj. Oni uzas metalojn por diversaj tipoj de protezdentaroj. Rilate al formo oni uzas metalon en drato, lada kaj aloja formoj. La diversaj specoj de metaloj oni prilaboras oron, arĝentpaladion, kromkobalton kaj rustrezistan ŝtalon. La draton oni uzas por fari krampojn, t.e. hoketojn por fiksi artefaritan dentaron al restintaj dentoj en buŝo kaj por variaj makzelortopediaj aparatoj. El lada oni kutimas produkti kronojn en flanka dentarparto per lutmetodo kombinita kun muldmetodo. La mulda metodo estas la plej uzata metodo de metalprilaborado por denta protezo.

Internacie la muldmetodo estas konata kiel la metodo de perdita vakso. La procedo estas simpla: oni pretigas vaksan modelon de krono, ponto aŭ alia lada konstruĵo. Al la modelo oni fiksis unu aŭ plurajn asstiftojn por fari giskanaleton por fandaĵo kaj oni metos ĝin en muldcilindron. Oni plenverŝos la cilindron per silikata kazo kaj post solidigo de la silikata sablo oni faros funelforman gistregon, en kiu oni metos la fandmetalon por la estonta muldaĵo. Por bari estiĝon de aervezikoj oni uzas dum la solidigo de silikata miksaĵo vaku-metodon. Tiamaniere estas senprobleme certigita glasta surfaco de muldaĵo. La cilindron kun vaksa modelo de konstruĵo oni metos en forbruligan kaj antaŭvarmigan formon. La spaco bezonata por engiso de fandaĵo estiĝos en la silikata formo per forbruligo de vakso.

En muldcentrifugilo efektiviĝas la gisado de fandaĵo en la formon. Nuntempe preskaŭ en ĉiuj laboratorioj oni uzas fandmetodon per indukta kurento.

Necesas senigi la muldaĵon je restaĵoj de silikatsablo. Tiucele servas pruciga aparato. Konstanta fluo de fajna korunda sablo perfekte senigos la muldaĵon je ĉiuseca malpuraĵo. Post detala manprilaborado sekvas ankoraŭ lasta fazo de matalprilaborado. Temas pri polurado de muldaĵo en elektroliza poluraparato.

Resumo:

La prelego koncize priskribis de uzatajn metodojn en stomatologia laboratorio, nome la prilaboradon de plasto (polimerigo procezo) kaj la prilaboradon de metaloj (muldmetodo).

revuo Stomatologia Forumo, numero 3-4, 1983.